

I^pI

Informilo *por* Interlingvistoj

Volumo 35 (kvara serio), numero 1 (134), 2026
ISSN 1385-2191

Eldonas

Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)
interlingvistiko.net ♦ [@CED_interling](https://twitter.com/CED_interling)

Redaktas

Başak ARAY  ♦ KIMURA Gorō Christoph (木村 護郎クリストフ) 
Jorge Antonio LEONI DE LEÓN  ♦ Bengt-Arne WICKSTRÖM 

Por kontakti la redakcion: IpI@interlingvistiko.net

ENHAVO

I	Eventoj	3
1	Ekspozicio «Vojaço: Per biciklo al Azio kun esperanto (1928–1932)», 2025-12-09 – 2026-03-31	3
1.1	Organizantoj	3
1.2	Loko	3
1.3	Temo	3
1.4	Priskribo	3
2	GIL-konferenco, 2025-11-21 – 23	4
2.1	Organizantoj	4
2.2	Loko	4
2.3	Temo	4
2.4	Programo	4
3	Laborrenkontiĝo: Artificial languages in the linguist’s toolbox (Artefaritaj lingvoj en la ilaro de la lingvisto), 2025-09-25 – 26	5
3.1	Organizantoj	5
3.2	Loko	5
3.3	Temo	5
3.4	Programo	5
II	Universitata kaj esplora agado	7
1	Esperanto-instruado ĉe Universidad de Costa Rica	7
2	Internacia esperanto-kurso de la Uniwersytet Jagielloński en la reto, 2025-11 – 2026-06	7
3	Erasmus-subtenata Miksita Intensa Programo (BIP) por studi Esperanton kiel interfakan kampon por transnacia novigado, 2028-01 – 2026-06	7
III	Kulturo	9
1	«Tre granda batalo pri tre malgranda lingvo»	9
2	Televida programo pri lingvoj	9

IV	Personoj	10
1	Esperanto ĉe UNESKO en Samarkando – Intervjuo kun Maximiliano Garcia, 2025-11-21	10
V	Bibliografiaĵoj	11
1	Disertacioj kaj diplomlaboraĵoj	11
2	Fakrevuaj artikoloj	11
3	Libroj	11
4	Libroĉapitroj	13
5	Revu-numeroj	13
5.1	Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik	13
5.1.1	Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik, 2025. ISBN: 978-3-96023-577-4.	13
5.1.1.1	Enhavo	13
5.2	Language Problems and Language Planning	15
5.2.1	Noto	15
5.2.2	Language Problems and Language Planning, 49:2 , 2025. ISSN: 0272-2690. E-ISSN: 1569-9889.	15
5.2.2.1	Enhavo	15
5.3	Beletra Almanako	17
5.3.1	<i>Beletra Almanako</i> , 52-53 , februaro-junio 2025. ISBN: 9781595694560. ISSN: 1937-3325.	17
5.3.1.1	Enhavo	17
5.4	Esperantologio / Esperanto Studies	19
5.4.1	Noto	19
5.4.2	<i>Esperantologio / Esperanto Studies</i> , Nova Serio 6 (14) , 2025. ISBN 9781595694515. ISSN 1311-3496.	19
5.4.2.1	Enhavo	19
5.5	Investigationes Linguisticae	22
6	Novajletoj	22
6.1	Global coalition for language rights (GCLR)	22
6.2	Observatoire européen du plurilinguisme (OEP)	22
6.2.1	La lettre d'information de l'OEP, 104 , 2025-09/10/11.	22

I EVENTOJ

1 EKSPozICIO «VOJAĜO: PER BICIKLO AL AZIO KUN ESPERANTO (1928–1932)», 2025-12-09 – 2026-03-31

1.1 *Organizantoj*

Kuratoroj: Pascal Dubourg Glatigny, Gabriela Skonieczna.

1.2 *Loko*

Biblioteka Narodowa (Nacia Biblioteko de Pollando)
al. Niepodległości 213
Varsovio

1.3 *Temo*

Bicikla vojaĝo tra du kontinentoj, al kiu rilatas miloj da dokumentoj malkovritaj post jardekoj kaj kiu rilatas al la historio de esperanto. La ekspozicio rakontas pri la eksterordinara vojaĝo de la juna esperantisto Lucien Péraire (1906–1997) kaj pri la strebo konservi la heredaĵon de movado kiu transpasas naciajn kaj kulturajn limojn.

1.4 *Priskribo*

En 1928 Lucien Péraire, tiam 22-jaraĝa, ekveturis el Francio orienten ĉirkaŭ la mondo. Lia historio restas ĝis hodiaŭ apenaŭ konata. Vojaĝante tra Eŭropo, Sovetunio, Japanio, Ĉinio kaj Sudorienta Azio ĝis Indonezio, Lucien serĉis respondon al fundamenta demando kiu brule aktualas ankoraŭ hodiaŭ: kio kaŭzas militojn kaj malamon inter nacioj?

Dum sia vojaĝo li observis, spertis kaj dokumentis la politikajn, ekonomiajn kaj sociajn kondiĉojn de la travojaĝitaj landoj. La dokumentaro de ĉi tiu eksterordinara vojaĝo – miloj da objektoj, inter kiuj taglibroj, stenografiaj notoj, tekstoj en la franca kaj en Esperanto, fotoj, poŝtkartoj, korespondaĵoj kaj tekstaĵoj – estis antaŭ nelonge remalkovrita en la kelo de pariza asocio.

La malcerta sorto de ĉi tiu kolekto emfazas la plej urĝajn defiojn kiujn frontas la esperanta heredaĵo hodiaŭ. La esperanto-movado, naskiĝinta en Varsovio antaŭ preskaŭ 150 jaroj, rapide disvastiĝis tra ĉiuj kontinentoj kaj en ĉiujn kampojn de homa agado: ne nur lingvo-propagandon sed ankaŭ literaturon, politikon, religion, sciencon kaj multajn aliajn fakojn. Esence transnacia, horizontala kaj tutmonda, la movado neniam disponis pri universitatoj aŭ bibliotekoj specife dediĉitaj al la flego de sia pasinto, kiu hodiaŭ frontas la tre realan riskon tute perdiĝi kaj forgesiĝi.

La dokumentaro de Péraire estis savita danke al cifereciga projekto financita de la Regiono Île-de-France. Tamen granda parto de la monda esperanta heredaĵo restas minacata. En 2023

la Nacia Biblioteko de Pollando faris esencan decidon transpreni de la Universala Esperanto-Asocio en Roterdamo la Hodler-kolekton, konsistantan el pli ol sep tunoj da neprilaboritaj materialoj. Varsovio, la naskiĝurbo de esperanto, tiel fariĝas unu el la ĉefaj centroj por la konservado de ĉi tiu unika heredaĵo.

La ekspozicio *Vojaĝo. Per biciklo al Azio kun esperanto (1928–1932)* malkaŝas la originalaĵojn de la Péraire-kolekto al la publiko por la unua fojo, prezentante zorge elektitan aron da objektoj kune kun dokumentoj konservataj en la Nacia Biblioteko de Pollando. La objektoj prezentiĝas en tri spacoj ritmitaj de centoj da fotoj kaj ilustras la evoluon de la esperanto-movado ĉirkaŭ 1930.

Komparu la jarkolekton de *IpI* **33** (2024) (paĝoj 63 kaj 84).

2 GIL-KONFERENCO, 2025-11-21 – 23

2.1 *Organizantoj*

La Societo pri Interlingvistiko (Gesellschaft für Interlinguistik, GIL), Sabine Fiedler, pezidantino

2.2 *Loko*

Berlino

2.3 *Temo*

Planlingvoj: Idealoj kaj valoroj dum konfliktplenaj tempoj

2.4 *Programo*

- Věra Barandovská-Frank: *Panslawische Sprachen in Konflikten vom Zarismus bis heute (Panslavaj lingvoj en konfliktoj de carismo ĝis hodiaŭ)*
- Wolfgang Kerkhoff: *Homaranismo – eine Metareligion als notwendige oder hinreichende Bedingung für den Weltfrieden? (Homaranismo – meta-religio kiel necesa aŭ sufiĉa kondiĉo por la monda paco?)*
- Klaus Schubert: *Das Streben nach Anerkennung – Wie die Esperanto-Bewegung in ihren ersten Jahrzehnten mit der Wissenschaftlerdebatte zu Plansprachen umging (La strebado por rekono – Kiel la esperanto-movado traktis la sciencan debaton pri planingvoj en siaj unuaj jardekoj)*
- Bernd Krause: *Der Monogrammist P.A.M. und seine Vision eines geeinten Europas mit Esperanto als Verkehrssprache (La monogramisto P.A.M. kaj lia vizio pri unuiĝinta Eŭropo kun esperanto kiel komuna lingvo)*
- Sabine Fiedler: *Impulsvortrag zum Thema »Künstliche Intelligenz und Interlinguistik« (Impulsprelego pri la temo «Artefarita intelekto kaj interlingvistiko»)*

- Cyril Robert Brosch: *Ein erster Blick auf die Neufassung des »Plena Ilustrita Vortaro« vor dem Hintergrund moderner elektronischer Lexikografie (Unua rigardo sur la nova versio de «Plena Ilustrita Vortaro»)*
- Cornelia Mannewitz: *Das Wörterbuch des Krieges (La vortaro de la milito)*
- Claus Killing-Günkel: *Neo – Strukturelle Nähe zu Esperanto bei etymologischer Eigenständigkeit (Neo – Struktura simileco al esperanto kun etimologia sendependeco)*
- Marcos Cramer: *Globale Neutralität in Plansprachen: Ein neuer Ansatz mit Dunianto (Tutmonda neŭtraleco en planlingvoj: Nova aliro kun dunianto)*

3 LABORRENKONTIĜO: ARTIFICIAL LANGUAGES IN THE LINGUIST'S TOOLBOX (ARTEFARITAJ LINGVOJ EN LA ILARO DE LA LINGVISTO), 2025-09-25 – 26

3.1 *Organizantoj*

La [projekto EXREAN](#): Experimental replication of historical reanalysis processes (Eksperimenta replikado de historiaj reanalizaj procezoj), Freie Universität Berlin

3.2 *Loko*

Berlino, Freie Universität

3.3 *Temo*

La amplekso de [artefaritaj lingvoj kiel ilo en lingvistika esploro](#): Trejnadmetodoj kaj lernadrezultoj de artefaritaj lingvoj por eblaj aplikoj ene de diversaj subkampoj de lingvistiko

3.4 *Programo*

- Kara Morgan-Short: *Neural underpinnings of artificial language learning (Neŭralaj fundamentoj de lernado de artefarita lingvo)*
- Kenny Smith: *The experimental study of semantic extension in novel communication systems (La eksperimenta studo de semantika etendo en novaj komunikaj sistemoj)*
- Jennifer Culbertson: *Investigating typological universals through artificial languages (Esplorante tipologiajn universalajn per artefaritaj lingvoj)*
- Mora Maldonado: *Processing/learning constraints affecting semantic universals (Prilaboradaj/lernadaj limoj influantaj semantikajn universalajn)*
- Zara Harmon: *Accessibility vs. frequency in semantic extension in artificial languages (Alireblo kontraŭ frekvenco en semantika etendaĵo en artefaritaj lingvoj)*

- Gareth Roberts: *Social and communicative pressures in shaping the emergence and evolution of language (Sociaj kaj komunikaj premoj en la formado de la apero kaj evoluo de lingvo)*
- Marieke Schouwstra: *Individual and cultural processes producing structured languages using “language creation” experiments (Individuaj kaj kulturaj procezoj produktantaj strukturitajn lingvojn uzante eksperimentojn pri «lingvokreado»)*

II UNIVERSITATA KAJ ESPLORA AGADO

1 ESPERANTO-INSTRUADO ĈE UNIVERSIDAD DE COSTA RICA

La instruado de Esperanto ĉe la [Universidad de Costa Rica](#) ŝanĝiĝis: ĝi ne plu kiel antaŭe estos kursoj je la bakalaŭra nivelo, sed je la postbakalaŭra kaj ili estos malfermaj al al studentoj pri filologio, lingvistiko kaj literaturo. Jen la priskribo de la esperantokursoj:

Ĉi tiu kurso celas enkonduki gestudentojn en la lingvan kaj kulturen studon pri Esperanto, kiel planlingvon kaj socikomunan fenomenon. Ĝiaj gramatikaj, leksikaj kaj fonologiaj fundamentoj estas traktataj, samkiel ĝiaj historia evoluo kaj rolo en la kunteksto de internaciaj lingvoj. Per la analizo de tekstoj, korpusoj kaj instrumaterialoj, la gestudentoj esploras kiel Esperanto evoluis el idealisma koncepto al vivanta komunumo kun literatura produktado, intelekta tradicio kaj tutmonda estiĝo.

La kurso ankaŭ enkondukos gestudentojn en interlingvistikon, kiel fakon analizantan la dinamikon de interkultura komunikado kaj planlingvojn kiel esprimojn de lingva konceptado kaj kreado. La kurso analizos la historiajn kialojn de Esperanto kiel respondo al lingvaj kaj kulturaj malegalecoj, samkiel ĝian nuntempan gravecon en diskutoj pri egaleco, tutmondiĝo kaj lingva diverseco. La fokuso de la kurso estas kaj teoria kaj praktika. Gestudentoj akiros bazajn kapablojn en Esperanto, komprenos ĝiajn internajn strukturojn, komprenos ĝian komunikan funkcion, kaj kritike komprenos ĝin en la kunteksto de naturaj kaj konstruitaj lingvoj.

2 INTERNACIA ESPERANTO-KURSO DE LA UNIWERSYTET JAGIELLOŃSKI EN LA RETO, 2025-11 – 2026-06

La Jagelona Universitato en Krakovo denove ofertas [esperanto-kurson](#) sur la nivelo B1 perrete. La kurson instruas Maria Majerczak vive kaj realtempe.

3 ERASMUS-SUBTENATA MIKSITA INTENSA PROGRAMO (BIP) POR STUDI ESPERANTON KIEL INTERFAKAN KAMPON POR TRANSNACIA NOVIGADO, 2028-01 – 2026-06

La universitatoj de Tours (Francio), Sevilla (Hispanio), Bamberg (Germanio), Parmo (Italio), Amsterdamo (Nederlando), Istanbul (Turkio), Gento (Belgio) kaj Bukareŝto (Rumanio) kune ofertas unikan programon de Erasmus+ (Blended Intensive Programme, BIP: Miksita Intensa Programo) por studi Esperanton kiel interfakan kampon por transnacia navigado. La programo

celas studentojn el la tuta Eŭropo, kiuj interesiĝas pri la rolo de lingvo en justa, egaleca kaj efika internacia komunikado, sendepende de sia fako aŭ studnivelo (bakalaŭra, magistra, doktora).

La programo esploras Esperanton el diversaj vidpunktoj: lingvistiko, filozofio, historio, sociolingvistiko, geografio, literaturo kaj aliaj. Inter la respondecaj profesoroj kaj instruistoj troviĝas internacie agnoskitaj fakuloj, inter ili Philippe Planchon (Tours), Federico Gobbo (Amsterdamo), Ecaterina Lung (Bukareŝto), Martin Haase (Bamberg), Baŝak Aray (Istanbul), Davide Astori (Parma), Dennis Keefe, Denis Eckert, Pascal Dubourg Glatigny kaj aliaj fakuloj pri lingvoj kaj transnaciaj studoj.

Pliaj informoj troviĝas [ĉi tie](#).

III KULTURO

1 «TRE GRANDA BATALO PRI TRE MALGRANDA LINGVO»

La revuo *The New Yorker* publikigis interesan artikolon pri normaligo de la romanĉa lingvo en Svislando. Tio ilustras du problemoj, kiujn frontas la lingvoplananto. La problemoj estas:

1. kiuj parencaj dialektoj apartenas al normigenda kaj normiginda lingvo?
2. ĉu normigi desupre aŭ demalsupre?

Ne nur ekzistas la svislandaj dialektoj de la romanĉa, sed ankaŭ la relative proksimaj ladina kaj friula lingvoj (aŭ dialektoj) en Italio. Ĉu ili apartenas al la normiginda lingvo? La lingvopolitikoj ĉi tie alfrontas malfacilan kompromison inter efikeco de komunikado (uzi vastan aron de dialektoj) kaj respekto por la lingvouzo de la parolantoj kiel identecsigno (defini multajn normigitajn lingvojn). Ni eĉ havas ekzemplon de malnormigado: en Jugoslavio ekzistis la serbokroata kiel normlingvo (kvankam kun du alfabetoj), kiu hodiaŭ oni disigas en du normlinvoj.

Ĉu oni dum normigo klopodu trovi «averaĝon» de la dialekto, aŭ ĉu oni prenu unu dialekton kiel komencan normon kaj modifui ĝin kun eroj de la aliaj variaĵoj? La du norvegaj lingvoj estas ekzemplo de ambaŭ manieroj. *Bokmål* estis komence la dana, kiun oni modifis kun novegaj dialekteroj. *Nynorsk* aliflanke estas klopodo trovi averaĝon de kelkaj dialektoj. Hodiaŭ ekzistas ambaŭ lingvoj en Norvegio, sed *Bokmål* senkompare estas la plej sukcesa.

Ni citas el la artikolo:

Schmid, [...], ne kreskis parolante romanĉan lingvon; li lernis ĝin en mezlernejo, kaj poste laboris pri la *Dicziunari Rumantsch Grischun*, romanĉa vortaro komencita en 1904 kaj ankoraŭ ne kompletigita. Sed la profundo de lia sperto estis impona. Kiam Cathomas frapis lian pordon, Schmid jam estis skizanta planon por normigo de la romanĉan lingvo laŭ la «plimulta principo» en kiu la plej vaste uzataj komunaj dialektoj venku.

Kion Cathomas ne antaŭvidis, estis kiom rapide la ordigita skemo, post kiam ĝi estus liberigita en la valojn, ekbruligus kverelojn, kiuj englutis svisajn klasĉambrojn, gazetojn kaj fine kantonan politikon – parabolo pri kiel provo certigi la supervivon de lingvo povas sentiĝi, al tiuj, kiuj estas normigitaj, kiel atako kontraŭ tio, kio distingas ilin.

2 TELEVIDA PROGRAMO PRI LINGVOJ

La franc-germana televida kanalo *Arte* faris programon pri la origino de lingvoj. En la videaĵo estas menciataj volapuko kaj esperanto. Volapuko ricevas grandan atenton per intervjuo de la nuna «cifal». La videaĵo esploras spekulativajn konceptojn pri origino(j) de lingvoj, la rilaton de lingvoj kaj kulturo kaj la malaperigon de lingvoj dum koloniismaj periodoj.

IV PERSONOJ

1 ESPERANTO ĈE UNESKO EN SAMARKANDO – INTERVJUO KUN MAXIMILIANO GARCIA, 2025-11-21

La filmisto Maximiliano Garcia, hispan-svisa membro de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), estis inter la reprezentantoj de Universala Esperanto-Asocio (UEA) dum la historigrava Ĝenerala Konferenco de UNESKO 2025 en Samarkando, Uzbekio. Kun la juna ĉina esperantistino 魏宁娜 (Wei NingNa), li multe varbadis tie pri la Esperanta film-projekto VALO (*Vojaĝo al la Oriento*).

Alessandra Madella lin intervjuis por la [China Global Television Network](#) (CGTN) de la Ĉina Komunikila Grupo ([中央广播电视总台](#)).

V BIBLIOGRAFIAĴOJ

1 DISERTACIOJ KAJ DIPLOMLABORAĴOJ

2 FAKREVUAJ ARTIKOLOJ

3 LIBROJ

ASTORI, Davide (2025). *Che cos'è una lingua inventata*, itala. Roma: Carocci editore. ISBN: 9788829032624.

Inventare lingue è, insieme, una necessità e un piacere: esse nascono per finalità ludiche, personali, emozionali, letterarie, cinematografiche, ma anche come ausilio alla comunicazione internazionale. Create ex novo o rimaneggiando il materiale offerto dalle lingue naturali, le lingue inventate dimostrano di essere anche un potente strumento di analisi culturale e linguistica. Dalle prime riflessioni di Cartesio alla nascita dell'interlinguistica moderna, il volume ce ne illustra storia, contenuti e finalità ricorrendo anche a una variegata gamma di esempi poco noti. Un'ottima occasione per conoscere la ricchezza di queste creazioni capaci di coniugare ricerca scientifica, immaginazione e dimensione ludica.

Enhavo:

- Introduzione
- 1. Creare lingue fra Otto e Novecento
- 2. Definire l'interlinguistica
- 3. Classificare le lingue inventate
- 4. L'«altro» Saussure: Alla ricerca di una moneta «internazionale»
- 5. Bausani e l'interlinguistica moderna: Il Markuska
- 6. Il Volapük, la lingua (rivelata) per il mondo
- 7. L'esperanto, una voce per il mondo
- 8. Il Latino sine flexione di Peano
- 9. Tre lingue mistico-sacrali: Il Balaibalan/La «lingua ignota» di Ildegarda di Bingen/L'Enochian di John Dee
- 10. Tre utopie: L'Uranopoli di Alessarco/La lingua di Utopia/L'Isola delle Rose
- 11. Il Solresol, fare una lingua con la musica
- 12. Toki Pona, la lingua minimale
- 13. Le lingue di Hollywood: Il Klingon/Li'fya leNa'vi
- 14. La pasigrafia, una scrittura per tutti: Due scritture naturali con «inclinazione» pasigrafica/Le scritture semasiografiche

- Bibliografia

MATTICCHIO, Isabella kaj Luca MELCHIOR, redaktoroj (2025). *Languages in contact: Official bilingualism and multilingualism in Europe: Austria, Croatia, Italy, and Slovenia*, angla, itala kaj germana. Fach – Sprache – Kommunikation 6. Hildesheim: Universitätsverlag Hildesheim. DOI: doi.org/10.18442/fsk-6.

Ĉi tiu volumo proponas ekzamenon de oficiala dulingveco kaj plurlingveco en nuntempa Eŭropo. Pere de ekzemploj el Aŭstrio, Kroatio, Italio kaj Slovenio, ĝi esploras kiel kunoficialaj lingvoj funkcias ene de instituciaj kadroj kaj kiel plurlingvaj politikoj estas efektivigitaj en praktiko. Aparta atento estas dediĉita al terminologio, tradukpraktikoj kaj lingva normigo en regionoj kie plimultaj kaj malplimultaj lingvoj kunekzistas. Uzante malsamajn alirojn, la kontribuoj malkaŝas kiel minoritataj kaj regionaj lingvoj – kiel la itala, la slovena, la friula kaj la ladina – interagas ene de kompleksaj instituciaj kaj kulturaj kunteksto. Ĉi tiu volumo kontribuas al aktualaj debatoj pri lingva diverseco kaj plurlingveco en Eŭropo, kaj povas interesi al akademiuloj, politikistoj kaj praktikistoj engaĝitaj en lingvaj rajtoj, protekto de minoritataj lingvoj kaj la dinamiko de plurlingva komunikado.

Enhavo:

- Isabella Matticchio & Luca Meelchior: Languages in contact: Official bilingualism and multilingualism in Europe – An introduction
- Marina Barbić-Poropat & Iva Peršić: Italiano e croato a contatto: il caso del linguaggio amministrativo in Istria
- Sandro Paolucci & Nives Lenassi: Tradurre per la comunità linguistica italiana del Litorale sloveno: osservazioni su alcune scelte traduttive nei testi amministrativi
- Emmerich Kelih: Korpuslinguistische Infrastruktur für das Kärntner Slowenische – was braucht es? Ein kurzer Forschungsbericht
- Matejka Grigič: Bi- and Multilingualism between Italy and Slovenia: New findings in language planning
- Gabriele Zanello: Il lessico della religione nel friulano attuale: l'elaborazione di una lingua liturgica
- Franco Finco: Il friulano nei giornali negli ultimi dieci anni
- Ruth Videsott: Kleinsprachen in Corona-Zeiten – Öffentliche Kommunikation im Ladinischen im Spannungsfeld zwischen Italienisch und Deutsch
- Authors

4 LIBROĈAPITROJ

5 REVU-NUMEROJ

5.1 *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik*

5.1.1 *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik*, 2025. ISBN: 978-3-96023-577-4.

5.1.1.1 *Enhavo*

- Cyril Robert Brosch & Sabine Fiedler: *Einführung (Enkonduko)*
- Věra Barandovská-Frank: *Braucht Europa noch Latein? (Ĉu Eŭropo ankoraŭ bezonas la latinan)*

La latina ludis centran rolon en eŭropa kulturo kaj klerigo dum jarcentoj. Kiel instrulin-gvo ĝi ebligis eŭropan moveblecon de profesoroj kaj studentoj. La angla ludas ĉi tiun rolon hodiaŭ. Krome, la praktika uzo de la latina en la ĉiutaga vivo estas limigita. Ki-on alian povas fari la latina en Eŭropo? Ties scio ankoraŭ ebligas kompreni la evoluon kaj strukturon de la latinidaj lingvoj. La latina gravas ankaŭ por terminologio (ekz. bio-logio, medicino, juro, teologio), kaj krome novaj sciencoj, kiel komputilscienco, ankaŭ uzas la latinan kiel fonton. En Eŭropo ekzistas organizaĵoj, kiuj strebas konservi niajn historiajn kaj kulturajn tradiciojn kaj promocii la latinan kiel vivantan lingvon. En mia artikolo mi ŝatus prezenti kelkajn el ili, ekz. Academia Latinitati Fovendae, SALVI, Schola Nova, Vivarium Novum, Societas Circulorum Latinorum, kaj kiel praktikaj ekzemploj la vestfalian L.V.P.A. (Latinitati Vivae Provehendae Associatio) kaj Latinitas (Saarbrücken). Tiaj organizoj ne nur transdonas tradiciajn eŭropajn valorojn kaj subtenas nian senton de kuneco, sed ili ankaŭ ligas nin kun la ĝeneraligita mondo per sia internacia kunlaboro.

- Wolfgang Kerkhoff: *Der Republik zu Ehren – Jean Delormels Sprachprojekt und die Convention nationale (1794) (Por honorigi la Republikon – La lingvoprojekto de Jean Delormel kaj la Convention nationale (1794))*

En la plej okazoriĉaj periodoj de la Franca Revolucio lingva normigo estis grava temo. Por certigi la unuecon de la respubliko oni volis subpremi la regionajn lingvojn favore al la nacia lingvo, la franca. Tiom pli surprizas, ke ĉi-kuntekste troviĝis ankaŭ pledo por internacia lingvo. Jean Delormel, juristo, retoro kaj okultismo, prezentis sian *Projet de Langue universelle* en 1794 al la Nacia Konvencio, tiutempe kaj parlamento kaj registaro. Oni agnoskis lian projekton kaj transdonis ĝin al la komitato pri klerigo. La projekto de Delormel malaperis unu jaron poste kune kun la Konvencio. El lingva vidpunkto ĝi estis apriora koncepto ellaborita nur supraĵe.

- Claus Killing-Günkel: *Kurzer Vergleich der Rechtschreibung des Japanischen und des Esperanto (Mallonga komparo de la ortografioj de la japana kaj Esperanto)*

Dum la ortografio de Esperanto homogena uzas la latinajn literojn en iomete reduktita versio kun supersignoj en la tradicio de slavaj lingvoj, la japana estas skribata en tri malsamaj skribsistemoj, kiuj kompletigas unu la alian kaj krome apartigas homofonojn. Esencaj traj-

toj de la lingva strukturo de la du lingvoj estas prilumataj per la skribado de Esperanto en tri malsamaj alfabetoj kiel penseksperimento.

- Bernd Krause: *Was sind Volapükbordüren? Beobachtungen und Gedanken zu einem Pasament aus dem Jahr 1888 (Kio estas Volapukaj borderoj? Observoj kaj pensoj pri pasamentoj de la jaro 1888)*

En 1888 en la modmagazino *Der Bazar* («La Bazar») aperis kompilado de aktualaj tendencoj en la manlabora sektoro. En ĝi ankaŭ estas menciitaj pasamentoj kun la nomo «Volapükbordüren» («Volapukaj borderoj»). La artikolo provas klasifiki tiujn borderojn, kiuj estas nek ilustritaj nek alie konataj, en la kuntekston de la jaro 1888, kiu markas la zeniton kaj ankaŭ la krizon de Volapuko kaj samtempe la komencon de la prospero de Esperanto. Mallonga enkonduko al la planlingvo Volapuko kompletigas la konsiderojn.

- Benoît Philippe: *Die Sächsische Esperanto-Bibliothek (La Saksa Esperanto-Biblioteko)*

La historio de la Saksa Esperanto-Biblioteko komenciĝis per ties fondo en la jaro 1912 en Dresdono, el kie ĝi jam post unu jaro devis translokiĝi al Lepsiko. En la jaro 1936 ĝi eskapis el minacanta bruligado fare de nazioj al Berlino. Sian duan vivon la Saksa Esperanto-Biblioteko komencis denove en Dresdono en la jaro 1968, kiam post longa malpermeso de Esperanto oni estigis modestan bibliotekon. Ĝia katalogado startis en la jaro 2001. Poste la libraro sesobliĝis ene de nur 23 jaroj. Nuntempe ĝi konsistas el preskaŭ 8000 libroj. Tiu evoluo faras la bibliotekon grava Esperanto-kontaktadreso en Saksio.

- Christian Siefkes: *Uropi, Interlawisch & Co. – zonale Hilfssprachen für Europa (Uropi, la interslava kaj kompanio – zonaj helplingvoj por Eŭropo)*

Planlingvoj kiel Esperanto, Interlingvao kaj Globasa estas koncipitaj kiel internaciaj helplingvoj – helplingvoj por la tuta mondo. Aliaj helplingvoj havas pli limigitan fokuson: zonaj helplingvoj estas destinitaj nur por uzo en certa mondregiono. Ĉi tiu limigo povas esti geografia (ekzemple, je kontinento kiel Eŭropo aŭ Afriko) aŭ lingva, rilatanta al lingvofamilio (kiel la tjurkaj lingvoj) aŭ subfamilio (kiel la latinidaj aŭ slavaj lingvoj). Ĉi tiu teksto ekzemple prezentas kaj diskutas kvar zonajn helplingvojn, kiuj celas al Eŭropo aŭ partoj de Eŭropo. Tri el ili estas intencitaj por komunikado inter parolantoj de branĉoj de la hindeŭropaj lingvoj: *Neolatino Romance* por la latinidaj lingvoj, *Folkspråk* por la ĝermanaj lingvoj, kaj la *interslava (Medžuslovjansky)* por la slavaj lingvoj. Kvara lingvo, *Uropi*, estas koncipita kiel helplingvo por la tuta Eŭropo. Simile al Esperanto, ĝi prenas siajn gramatikajn strukturojn kaj vortaron el diversaj (hind-)eŭropaj lingvoj; tamen, male al Esperanto, ĝi ne postulas esti same taŭga por aliaj kontinentoj, kie aliaj lingvofamilioj estas pli oftaj.

- Julian Tegeler: *Die Plansprache Esperanto als Ausgangs- und Zwischensprache in der Literatur (La planlingvo Esperanto kiel fonto- kaj interlingvo en la literaturo)*

Tiu ĉi artikolo enhavas la ĉefajn partojn de t. n. BeLL-ellaboraĵo. BeLL estas la mallongigo por *Besondere Lernleistung* (speciala lernatingaĵo), kiu estas elemento de gimnazia edukado en la Libera ŝtato Saksio havanta la celon plibonigi studkapablojn. En sia fina lerneja jaro lernantoj verkas ellaboraĵon pri mem elektita temo kaj tiel montras siajn konojn eltrovi, prilabori, dokumenti kaj prezenti informojn, kaj pluevoluigas tiujn en kunlaboro

kun reprezentantoj en eksterlernejaj esplorinstitutoj. En tiu ĉi artikolo la aŭtoro prezentas sian esploron pri Esperanto-literaturo kaj siajn spertojn dum tradukado de ĉapitro de porinfana libro el Esperanto al la germana.

- Kristin Tytgat: *Mehrsprachigkeit in Brüssel: Wie ist die Lage 2024?* (*Multlingveco en Bruselo: Kia estas la situacio en 2024?*)

En la periodo 2019–2024 la brusela ministro por plurlingveco prenis plurajn iniciatojn por subteni la lingvokapablon de la enloĝantoj. Lia celo estas, ke bruselanoj estu trilingvaj je la aĝo de 18 jaroj kun kono de la franca, nederlanda kaj angla lingvoj. Okulfrapa elemento en tiu politika agado estas, ke multaj projektoj kun bonaj intencoj limiĝas je akademia aplikado. Por obteni veran politikan rezulton la brusela registaro devus urĝe reformi la lingvajn leĝojn de la belga ĉefurbo. Laŭ la kvina lingvobarometro (2024) la franca lingvo malkreskas, dum la angla lingvo fariĝas pli grava. Preskaŭ kvinono de la enloĝantoj ne parolas la francan, kiu estas la plej grava uzata lingvo en la urbo.

- Fritz Wollenberg: *Eine neue Publikation zur Geschichte des Deutschen Esperanto-Bundes* (*Nova publikigaĵo pri la historio de la Germana Esperanto-Asocio*)

La kontribuo prezentas libron, en kiu la aŭtoro priskribas la 100 germanajn Esperanto-Kongresojn, kiuj okazis de 1906 ĝis 2023. Li nomas gravajn fontojn de la nova publikigaĵo kaj mencias la titolojn de la 20 ĉapitroj, en kiuj evidentiĝas la varia historio de la Germana Esperanto-Asocio. Li atentigas pri la granda trezoro de spertoj kaj pri la multaj personoj el scienco, arto, kulturo kaj politiko de la Esperanto-movado, prezentataj en la nova libro rilate al la germanaj kongresoj.

5.2 *Language Problems and Language Planning*

5.2.1 Noto

Michele Gazzola estas la nova ĉefredaktoro de *Language Problems and Language Planning* ekde 2026.

5.2.2 [Language Problems and Language Planning](#), 49:2, 2025. ISSN: 0272-2690. E-ISSN: 1569-9889.

5.2.2.1 *Enhavo*

- Gulzhamal Toktogulova, Sayipzhamal Sakieva, Sabira Osmonalieva, Kubanychbek Uraimov & Meergul Asanalieva: *Prospects of Kyrgyz language transition to the Latin script based on experience of Kazakhstan and Uzbekistan*

Perspektivoj de transiro de la kirgiza lingvo al la latina skribo bazitaj sur la spertoj de Kazaĥio kaj Uzbekio

Tiu ĉi studo celas fronti la potencialajn defiojn, avantaĝojn kaj malavantaĝojn ligitajn al realigo de la strategio por transiri de la cirila al la latina skribmaniero surbaze de la sperto de Kazaĥio kaj Uzbekio. Obstaklis la transiron manko de financaj rimedoj, kreskanta socia rezisto, kaj antaŭvido de kultura fendo inter maljunaj kaj junaj generacioj. Se temas pri la politika situacio, oni notis faktorojn kiel ekzemple la multnaciecon de la kirgizia

enloĝantaro, la antaŭvidon de reviviĝo de nacia konscio kaj la politikan volforton de la gvidantaro. Rilate edukadon, oni konsideris la transŝalton al latino kiel manieron rapidigi la lernadon de la angla lingvo kaj pozitive efiki je evoluigo de informa teknologio. El ekonomika vidpunkto, la transiro povus rezulti je antaŭenpuŝo en evoluigo de informa teknologio kaj la presa industrio.

- Cecilia Gialdini: *Talking over the catastrophe: Linguistic justice in disaster risk reduction*

Parolante pri la katastrofo: Lingva justeco en katastrofriskoredukto

La nuna referaĵo esploras la urĝan bezonon integri lingvan justecon en riskoreduktado post katastrofoj (angle: DRR) kaj resaltoplanado. Lingva maljusteco povas kaŭzi longdaŭran vundiĝon eĉ en normalaj tempoj, limigante aliron al esencaj servoj, marĝenigante minoritatajn grupojn, kaj profundigante sociajn neegalecojn. Tamen, dum katastrofoj la konsekvencoj de lingva ekskludo povas esti eĉ pli ruinigaj – fariĝante, tute simple, aferoj de vivo aŭ morto. Kvankam navigo de lingvopolitiko estas jam ŝarĝita de defioj eĉ en pacaj kuntekstoj, ĝi eĉ plikomplikiĝas sub la premo de krizoj. La nuna artikolo lokas lingvan justecon ene de la pli vasta literaturo pri mastrumado de katastrofoj, kun aparta fokuso kadre de DRR. Ĝi ekzamenas la mastrumadon de lingva diverseco kaj la respondecojn de la ŝtato pri mildigo de lingve bazitaj malavantaĝoj en kaj naturaj kaj home faritaj katastrofoj. Fine, la artikolo utiligas la modelon Mi/Ci (de Etkin kaj Timmerman 2013) kaj la solidarece-bazitan aliron al lingvoj (de Peled 2024) por proponi alternativan etikon de katastrofo-mastrumado kiu centrigas lingvan justecon.

- Feng Mao, Rita Elaine Silver & Qian Luo: *The evolution of language education policies and international relations in China: A structural realist perspective*

La evoluo de lingvaj edukpolitikoj kaj internaciaj rilatoj en Ĉinio: Perspektivo de strukturrealisto

Tiu ĉi referaĵo prezentas analizon de la evoluo de ĉinlingva eduka politiko en kunteksto de la monda transformiĝo de tiu lando. Ĉerpante el la teorio de struktura realismo en internaciaj rilatoj, ni asertas, ke la lingvopolitikaj ŝanĝoj de Ĉinio estas motivitaj de la dinamikaj interagoj inter la enlandaj evoluoj de difinita lando kaj ĝia ŝanĝiĝanta pozicio en la internacia sistemo. Per ekzameno de politikaj dokumentoj, la studo malkaŝas tri grandajn modifojn de la lingvoeduka politiko de Ĉinio en la pasintaj tri jardekoj: el ekonomia al politika orientiĝo, el emfazo de kultura ensorbado al kultura produktado, kaj el fokuso je la angla kiel la ĉefa fremda lingvo al subteno de multlingva pejzaĝo. Tiujn ŝoviĝojn oni analizas kiel la strategiajn respondojn de Ĉinio al ĝia sekvado de naciaj interesoj ene de ŝanĝiĝanta internacia medio. La analizo ne nur kontribuas al kompreno de politikaj ŝanĝiĝoj en Ĉinio, sed ankaŭ faras kontribuon al la kampo de lingvopolitiko per elmontro de la eksplika potenco de la teorio de internaciaj rilatoj por kompreni lingvopolitikajn ŝanĝojn kuntekste de tutmondiĝo.

- Marco Civico: *Recenzo de “Matteo Casoni, 2024. Posizione e vitalità dell’italiano nel contesto aziendale e lavorativo svizzero”*.
- Qingyun Ding: *Recenzo de “Qi Shen, 2023. Foreign Languages Planning in China from*

the Perspective of Global Governance [全球治理视域下的中国外语规划]”.

- Muhammed Parviz: *Recenzo de “P. K. Sah & F. Fang (Eds.), 2023. Policies, Politics, and Ideologies of English-Medium Instruction in Asian Universities: Unsettling Critical Edges”*.

5.3 *Beletra Almanako*

5.3.1 *Beletra Almanako*, 52-53, februaro-junio 2025. ISBN: 9781595694560. ISSN: 1937-3325.

5.3.1.1 *Enhavo*

- Prezento
 - Probal Daŝgupto
- Originala prozo
 - Sten Johansson: *Farango*
 - Cho Sung Ho: *Blanka plafono*
 - Su Fidler Cowling: *Gvatanta Tomaso*
 - Roberto Pérez-Franco: *Du mikronoveloj (La entrudulino; Perdita)*
 - Mikaelo Bronŝtejn: *Miaj inĝeniaj konversacioj kun la nepino*
 - Evgenij Georgiev: *Raĥab, saluton!*
 - Yin Jiaxin: *Revene al hejmo*
 - Yin Jiaxin: *Amo profundiĝas enkoren*
 - Laure Patas d’Illiers: *Sonĝo de amebo*
- Originala poezio
 - Nicola Ruggiero: *Gazalo*
 - Louis Genin: *Sed ne forgesu...*
 - Jado (Wei Yubin): *Kolekta Klarigo: Lumo de Revenvojo (Somera voko; Reveno post vesperstudado; Patro revenas de la bazaro; Ĉe festo, revenante hejmen; Adiaŭo; Post jaroj)*
 - Gonçalo Neves: *La fia komedio*
 - Jesper Lykke Jacobsen: *Sezonaj sonetoj (Aŭtuno; Vintro; Printempo; Somero)*
 - Jesper Lykke Jacobsen: *Alvoko*
 - Minosun: *Al mia mentoro Seimin*
 - Jubert Cabrezos: *Tanagaoj*
 - Nikola Rašić: *Du poemoj (Telefonado al postmoderno; Vento kaj velo)*

- Blazio Vaha: *Poemoj (Pri-Zamenhofa Zamenhofado; Budapeŝta Esperanta holunĝo kun peskaj pruntaĵoj, je la kvina horo aŭrore, post Prajdo, en la jaro 2025a; Dialoga Esperanto-halanĝo marda kun peskaj pruntovortoj; Kutam, kiu estas vi?)*
- Tradukita prozo
 - Shao Baojian: *Eterna pordo*; tradukis Minosun
 - Pádraic Ó Conaire: *Mia nigra azeneto*; tradukis Gabriel Beecham
 - Colette: *Du rakontoj (La spiralaĵoj de la vito); La kanto de la dancisto*; tradukis Thierry Tailhades
 - Rob Scherjon: *La fluganta domo*; tradukis Nikola Rašić
- Tradukita poezio
 - Robindronath Tagor: *Mia vojo disvagi*; tradukis Probal Daŝgupto
 - Ricardo Miró kaj Joaquín Pablo Franco González: *Du panamaj poemoj (Patrio; En la mar’)*; tradukis Roberto Pérez-Franco
 - Loufu: *Ekster fumo*; tradukis Minosun
 - Tanikawa Shuntaro: *Adiaŭ*; tradukis Kitagawa Hisasi
 - Homero: *Odiseado (Tria kanto)*; tradukis Abel Montagut
- Teatro
 - Luiza Carol: *La vojerarintoj. Monologo de virino spektanta la operon La Traviata de Verdi*
 - Luiza Carol: *Kaj jam brilis la steloj. Monologo de spektantino*
- Artikoloj kaj eseoj
 - Anna Tüskés: *Intervjuo kun Éva Tófalvy*; tradukis Blazio Vaha
 - Éva Tófalvy: *La mondo en 2082 laŭ Sándor Szathmári*
 - István Simon: *La senkompata humanisto*
 - Maurizio Giacometto: *Vojaĝo al Kazohinio de Sándor Szathmári, kiel reviviĝo de raciismo en la 20a jarcento*
 - Jado (Wei Yubin): *La Spirado de lingvo: ekde la Budapeŝta Esperanta rondo. Pri la viva uzo, novkreado kaj la potenco de la klasikaĵoj*
 - Abel Montagut: *Pri esperantigo de virinaj nomoj, precipe tiuj el la antikva greka. Kelkaj esploroj kaj proponoj*
 - Wolfram Rohloff: *Cent jaroj da Biblio: okazo esplori*
 - Vejdo (Wei Yida): *Variantoj en tradukado de la ĉinaj antikvaj poemoj*
 - Wang Chongfang: *Pri la formo de miaj tradukoj de ĉinaj klasikaj poeziaĵoj*
 - Marc van Oostendorp: *Suneroj en kesto. Leteroj inter Ada Magnina kaj Eduard Bakker (1934-1935)*

- Wera Blanke: *Mankanta litero*
- Miguel Fernández: *Poezio kadre de la 83a kongreso de HEF*
- Yoshiro Hashimoto: *La rajto vivi kiel individuo kaj civitano. Kion mi kapablas fari nun?*
- Recenzoj
 - Trevor Steele: *Epistolo al Philémonos* de Vinko Ošlak
 - Debra Hamel: *La edzino de l' tempvojaĝanto* (tradukis István Ertl) de Audrey Niffenegger
 - Geoffrey Greatrex: *Wisdom's House, Heaven's Gate. Athens and Jerusalem in the Middle Ages* de Teresa Shawcross
 - Cho Sung Ho: *Rakontaro de Genĝi* (tradukis Yamasita Tosihiro) de Audrey Niffenegger
 - Valentin Melnikov: *Centvorte* de Jorge Rafael Nogueras
 - Paulo Sergio Viana: *Nubumo* (tradukis Nicolino Rossi) de Giuseppe Campolo

5.4 *Esperantologio / Esperanto Studies*

5.4.1 Noto

La revuo *Esperantologio-Esperanto Studies* ekde nun estas oficiale agnoskita kiel scienca revuo fare de ANVUR, la itala nacia agentejo por taksado de universitatoj kaj esploroj. Por tiuj, kiuj laboras en italaj universitatoj, tio signifas, ke publikaĵo en EES validas por akademiaj karieroj en «fako 10» (filologio, literaturo, lingvistiko).

5.4.2 *Esperantologio / Esperanto Studies*, Nova Serio 6 (14), 2025. ISBN 9781595694515. ISSN 1311-3496.

5.4.2.1 *Enhavo*

- Christopher Gledhill & Klaus Schubert: *Antaŭparolo. Multifaceta Esperantologio*
- Mark Fettes: *Renato Corsetti (1941–2025), Nekrologo*
- Renato Corsetti: *Esperantistoj fronte al afrikaj lingvoj*

Esperanto disvastiĝas tre rapide nun en Afriko kaj la entuziasmo pri ĝi eĉ superas tiun en aliaj kontinentoj. Intertempe la lingva situacio en Afriko komencas ŝanĝiĝi favore al uzado de lokaj lingvoj ankaŭ en Okcidenta Afriko. Estas kelkaj ĉefaj kaŭzoj pri tio, kiuj resumeblas per ŝanĝo de la politiko de la Monda Banko, kiu dum jardekoj donis pruntojn al evoluantaj landoj nur kun la kondiĉo, ke ili instruu grandajn internaciajn lingvojn. El tio sekvas, ke oni pli kaj pli ekuzas afrikajn lingvojn en edukado. Sekve nia movado bezonas la samajn komparajn studojn, kiujn oni jam faris en la pasintaj jardekoj pri la suahila, se oni volas vere produkti lerno-materialon efi kan pri Esperanto en afrikaj lingvoj.

- Ilona Koutny: *La rolo de István Szerdahelyi en interlingvistiko kaj esperantologio*

István Szerdahelyi instituciigis la universitatan instruadon de interlingvistiko kaj esperantologio – tio jam donus al li decan rolon en la historio de esperantologio. Sed li estis ankaŭ elstara interlingvisto, esperantologo kaj pedagogo. La artikolo skizas liajn plej gravajn atingojn en la tereno de interlingvistiko (loko kaj sistema prezento de la tereno, hungaraj planlingvoj) kaj esperantologio (nova, lingvistika aliro al morfemklasifiko, strukturaj trajtoj de Esperanto, komenco de la neglektita semantika esploro de Esperanto, sistema prezento de etimologiaj operacioj).

- Martine Mussies: *Fanfiction in Esperanto – Esperanto in fanfiction*

Fikcio de fanoj en Esperanto – Esperanto en fikcio de fanoj

La rolo de Esperanto en fikcio de fanoj donas konvinkan ekzemplon pri la manieroj, per kiuj konstruitaj lingvoj funkcias ene de la cifereca partoprena kulturo. Ĉi tiu artikolo ekzamenas la rimedojn, per kiuj Esperanto aperas en rakontoj kreitaj de fanoj, kaj kiel rakonta ilo kaj kiel rimedo por lingva eksperimentado. Ĝi ankaŭ esploras kiumaniere Esperanto uziĝas kiel estonteca komuna lingvo en sciencfikcio, kiel sekreta aŭ rezista lingvo en distopiaj scenaroj, kaj kiel ponto inter diversaj kulturoj kaj roluloj. Aldone, ĝi konsideras la fenomenon de fanfikcio tute verkita en Esperanto, elstarigante ĝian uzon en tradukprojektoj kaj originaj rakontoj. Per analizo de ekzemploj, inkluzive de *Ruĝen: rakonto pri intima socialismo* kaj *Now You're Thinking With Portals! Wait, That's Knot Right*, la artikolo esploras la defi ojn de lingva aŭtenteco, precipe kiam Esperanto estas uzata pere de maŝintradukado. Plue, ĝi ekzamenas la vastiĝon de esperantista fan-kreado preter teksta rakontado, kiel montras *La Kanto de Tamar*, fankreita kanto (fare de la aŭtoro de ĉi tiu artikolo), kiu kunfandas sciencfikcion kaj historian legendon. Ĉi tiu studo finfine montras, ke la ĉeesto de Esperanto en fanfikcio transpasas simplan lingvan ludon; ĝi funkcias kiel dinamika ilo por mondkonstruado, identeca esplorado kaj alternativa rakontado en la nuntempa fankulturo.

- GONG Xiaofeng: *Apliko de Universalaj Trajtoj de Tradukado en la esperantigita ĉina klasika romano «Ruĝdoma sonĝo»*

«Hong lou meng» (Ruĝdoma sonĝo) estas unu el la kvar famaj klasikaj romanoj en Ĉinio. De ĝi aperis ĝis nun tradukaĵoj en 22 fremdlingvoj, inter ili ankaŭ troviĝas esperanta versio tradukita de s-ro Xie Yuming. La romano estas bona esplorcela materialo por tradukarto. Pro diferencoj en kulturo kaj kognaj temoj, malkongruoj inter la originala teksto kaj la tradukita teksto estas neeviteblaj dum la integra procezo de tradukado. Laŭ hipotezo de Mona Baker (1992), tradukitaj tekstoj ankaŭ havas apartan «tradukan stilon», kiun oni povas karakterizi per kvar Universalaj Trajtoj de Tradukado, nome: simpligo, eksplicitigo, normigo kaj interfero. Surbaze de tiu teorio, ĉi tiu studo prezentas analizon pri la plej ofte cititaj Universalaj Trajtoj en la esperanta versio de *Ruĝdoma Sonĝo*, kompare kun du konataj tradukoj en la angla lingvo (Cao Xueqin, trad. Hawkes kaj Minford 1973; Cao Xueqin, trad. Yang kaj Yang 1978). La rezultoj montras, ke la hipotezo de Universalaj Trajtoj de Tradukado estas valida aŭ parte valida en la tri tradukaĵoj.

- Philippe Planchon: *Evoluo de la afiksoj kaj de ilia memstara uzo en Esperanto*

Kvankam Esperanto estis komence ellaborita kiel lingvo-projekto, ĝi fariĝis iom post iom vivanta lingvo por sia komunumo de parolantoj. La uzo de vasta sistemo de afiksoj en Esperanto povus esti konsiderata kiel la simptomo de tiu artefarita deveno. Tamen laŭ etimologia vidpunkto oni vidas, ke Esperanto prunteprenis siajn afiksojn de naturaj lingvoj, ĉefe de hind-eŭropaj lingvoj. Malgraŭ tio, problemo aperas kiam oni konsideras la memstaran uzon kiu povas esti aplikata al tiuj afiksoj, pro tio ke tia uzo ŝajnas iel nekutima afero. Tio instigas nin interesiĝi pri la sistemo de la afiksoj en Esperanto, esplorante tiun sistemon laŭ diakrona perspektivo. Tiu esploro estas bazita sur la korpuso de *Tekstaro*, kaj ĝi disvolviĝas per komparo inter la derivila uzo kaj la memstara uzo de tiuj afiksoj. La evoluo de tiu sistemo alportas pli klaran vidon pri la lingvaj procezoj kiuj funkcias interne de Esperanto, lingvo kiu emas fariĝi natura lingvo post sufiĉe signifa periodo de tempo.

- Bernd Krause: *Inter arma lingvo kaj lingvo de paco. Observoj pri la uzado de Volapuko kaj Esperanto en la Duobla Monarkio de Aŭstrio-Hungario*

En dokumenta filmo pri la tronheredontoj Vilhelmo de Hohencolerno (1859–1941) kaj Rudolfo de Habsburgo (1858–1889), publikita en la jaro 2022, estas menciite, ke Rudolfo revis pri unuiĝinta Eŭropo kun Esperanto kiel oficiala lingvo. Konsiderante la plej gravajn fontojn (proprajn verkojn kaj leterojn de Rudolfo) kaj ankaŭ biografiajn studojn, oni povas pruvi, ke tiu aserto estas malvera. Sed Rudolfo temigas la armean lingvon de Aŭstrio-Hungario, la lingvon de la militistaro, en kiu ordonoj estis donitaj kaj raportoj estis peritaj. Tio estis la germana. Multaj soldatoj en la diversnacia ŝtato, kiuj nur regis siajn proprajn gepatrajn lingvojn, ne komprenis ĝin. Por kontraŭstari la problemon, Volapuko kaj Esperanto estis konsiderataj kiel eblaj armelingvoj. En 1920, post la dissolvo de Aŭstrio-Hungario, eĉ estiĝis vizio pri estonta unueca ŝtato de Mezeŭropo, en kiu Esperanto estus konstante uzata kiel sola lingvo, inkluzive kiel la armean lingvo de la unuiĝintaj armitaj fortoj.

- Kristin Tytgat: *La Internacia Asocio de Policistoj kaj Esperanto. Notico*

La Internacia Asocio de Policistoj (IPA) uzas Esperanto-emblemon: «Servo per amik-eco». En tiu ĉi artikolo ni esploras kio estas IPA kaj kio estas ĝiaj celoj kaj historio. Ni komparas la multajn paralelojn en la organiza strukturo de IPA kun tiuj de Universala Esperanto-Asocio.

- Ulrich Lins: *Recenzo de «Ian Rapley, 2024. Green star Japan: Esperanto and the international language question».*
- Dan Savatovsky: *Recenzo de «Mira Sarikaya, 2023. Die bestmögliche aller Sprachen».*

5.5 *Investigationes Linguisticae*

6 NOVAĴLETEROJ

6.1 *Global coalition for language rights (GCLR)*

6.2 *Observatoire européen du plurilinguisme (OEP)*

6.2.1 [La lettre d'information de l'OEP](#), 104, 2025-09/10/11.

IpI estas eldonaĵo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. ISSN 1385-2191.

Por ricevi informon pri estontaj numeroj, aŭ por sendi eldonotajn informojn, retmesaĝu al ipi@esperantic.org. Limdatoj por numero de sekva monato estas: 28-a de februaro, 31-a de majo, 30-a de aŭgusto kaj 30-a de novembro. Kontribuaĵoj el ĉiuj mondaj regionoj estas bonvenaj. Ni akceptas materialon en Esperanto aŭ en alia lingvo.

Estraro de CED

**Mark FETTES (direktoro) ♦ Guilherme FIANS ♦ Klaus SCHUBERT
Humphrey TONKIN ♦ Michele GAZZOLA.**